# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-10-31 n-ro 341


# Saud-Arablando donis civitanecon al roboto



Almenaŭ 29 homoj mortigitaj en atako al hotelo en Mogadiŝo

Kirgizio: lukti kontraŭ la edzinigoj per forkaptado de neplenaĝulinoj

Realiĝas vertikalaj farmoj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Kirgizio: lukti kontraŭ la edzinigoj per forkaptado de neplenaĝulinoj
*Lukto por la virinaj rajtoj p. 03*

Almenaŭ 29 homoj mortigitaj en atako al hotelo en Mogadiŝo
*Du bombatakoj p. 04*

Prezidanto de kurda regiono en Irako deklaris rezignon
*Masoud Barzani p. 04*

Realiĝas vertikalaj farmoj
*Kultivi nutraĵojn en altegaj domoj p. 05*

Saud-Arablando donis civitanecon al roboto
*Sophia estas maŝino kun artefarita inteligenteco p. 06*

Dum 20 jaroj kreskis 100 mil kvadrataj metroj da koraloj
*Kultivado de koraloj p. 07*

Hodiaŭe
*Einar Benediktsson; John Keats; Karel Havlíček Borovský; kaj Hundo p. 08*

# Kirgizio: lukti kontraŭ la edzinigoj per forkaptado de neplenaĝulinoj

Ajda KASIMALI[J]EVA, la plej juna deputitino en la Kirgiza parlamento, estas fronte de la lukto por la virinaj rajtoj.




En Kirgizio, la edzinigoj per forkaptado de neplenaĝulinoj estas multnombraj. Unu knabino el 10 estas edzinigita antaŭ ties 18-jaraĝa laŭ la Fonduso de UN por loĝantaro, kaj unu el 5 estas edzinigita per forkaptado laŭ la NROs, malgraŭ la malpermeso de tiu praktiko en 2013.

Nur dum unu pasinta jaro, la malmultnombraj deputitinoj de la Kirgiza parlamento sukcesis malpermesi la religiajn edzinigojn kun neplenaĝulinoj. Tamen la lukto tute ne estas finita, kiel eksplikas la plej juna parlamentanino, Ajda KASIMALIJEVA, 33-jara, kiu ja intencas defendi la rajtojn de la virinoj kaj plibonigi iliajn vivojn:

«*Ala Kaŝuu*, la edzinigo per forkaptado estas grava problemo en Kirgizio. Multaj homoj asertas, ke temas pri tradicio. Sed forkapti knabinon kontraŭ ŝia volo tute ne estas tradicia, tio estas ŝtelo de persono».

«La viroj neniam pensas pri la hejmperfortoj kaj forkaptadoj. Male, ili luktas por leĝoj, kiuj ebligu al ili havi du edzinojn, ebligante poligamion. Ili asertas, ke la virinoj ne havas problemon, ili restadu hejme».

Malgraŭ la malpermeso de la edzinigo per forkaptado antaŭ kvar jaroj, triono el la kirgizaj geedziĝoj en tiu lando de Centra Azio, eks-soveta respubliko, la virinoj estis forkaptitaj kaj devige edzinigitaj al viroj ofte pli aĝaj. Kaj malgraŭ la malpermeso de la religiaj geedziĝoj kun neplenaĝulinoj, ne ĉiuj imamoj respektas tiun novan regulon.

Ajda KASIMALIJEVA esperas, ke ŝi estos ekzemplo por ĉiuj kirgizaj virinoj, montrante, kio povas esti realigita, kiam virino leĝigas kaj administras. Ŝi esperas fariĝi prezidentino de Kirgizio post 10 aŭ 15 jaroj.

Neniam Milito Inter Ni

# Almenaŭ 29 homoj mortigitaj en atako al hotelo en Mogadiŝo

Dimanĉe [29 okt 2017] matene laŭ la loka tempo, Somalia sekurectrupo mortpafis kaj kaptis kvin teroristojn en la atakita hotelo en la ĉefurbo Mogadiŝo post tutnokta batalo.




Sabate posttagmeze en la ĉefurbo okazis du bombatakoj, kaj unu okazis ĉe la pordo de multe vizitata hotelo, difektante ĉirkaŭajn konstruaĵojn. Poste pluraj atakantoj ekokupis la hotelon, kaj batalis kun la sekurectrupo, kaj la batalo daŭris ĝis la mateno de la sekva tago.

La novaĵ-agentejo REUTERS raportis, ke loka policano diris, ke almenaŭ 29 homoj estis mortigitaj en la atako kaj la batalo, kaj la nombro de mortintoj eble pliiĝos. La estro de loka policstacio HUSSEIN diris, ke inter la mortintoj estis tri infanoj, altranga policoficiro, parlamentano kaj eksa ministro pri financo.

La somalia ekstremisma grupo *Al Shabaab*, ligita kun terorisma grupo *Al-Qaeda*, deklaris sian respondecon pri la atako. Ĝi lanĉis plurajn atakojn en Somalio kaj najbaraj landoj en la lastaj jaroj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Prezidanto de kurda regiono en Irako deklaris rezignon

Kurdaj amaskomunikiloj en Irako raportis dimanĉe [29 okt 2017], ke prezidanto de la Kurda aŭtonoma regiono de Irako Masoud BARZANI diris tiutage en sia letero prezentita al la regiona parlamento, ke li ne laboros plu sur la posteno de regiona prezidanto ekde la 1a de novembro.



BARZANI diris, ke ŝanĝo de la leĝo pri la prezidanteco de la Kurda regiono aŭ longigo de ĝia oficperiodo estas neakceptebla.

Laŭ leĝo, la parlamenta elekto kaj la prezidanteca elekto en la Kurda regiono okazas en ĉiu kvara jaro, kaj ĉiu elektita prezidanto povas servi maksimume du oficperiodojn. BARZANI servis du periodojn de 2005 ĝis 2013. Estis malsamaj opinioj pri lia plua servo sur la posteno de post la fino de la oficperiodo en 2013, kaj la elekto de prezidanteco ne povis estis okazigita en difinita tempo, kaj pro tio li restas sur tiu ĉi posteno.

La 25an de septembro la kurda regiono okazigis referendumon pri sendependeco spite al la opono de diversaj partioj. La Nacia Asembleo de Irako adoptis rezolucion en la sama tago, kiu postulas, ke la registaro prenu kontraŭrimedojn, kaj unu el la rimedoj estas sendi trupojn al la disputataj regionoj ekster la kurda administracia regiono.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Realiĝas vertikalaj farmoj

Komence de tiu ĉi jarcento aperis la ideo kultivi nutraĵojn en altegaj domoj - kaj rapide tiu ideo estis forviŝita ĉar oni konsideris ĝin nerealisma. Sed intertempe tiu koncepto revekiĝis.



La homaro kreskas kaj kun ĝi la urboj. Laŭ prognozo de UNO en la jaro 2050 tri kvaronoj de ĉiuj homoj vivos en urboj. Samtempe kreskas la bezono pri nutraĵoj kaj pro tio la bezono pri agrikulturaj areoj. Do restos ĉiam malpli da spaco sur nia planedo. Multpromesa solvo por tiu problemo estas vertikala agrikulturo, precipe tie kie la nutraĵoj estas bezonataj - en la urboj mem.

La apero de tiu ideo datiĝas el la jaro 1999 kiam emerita profesoro de la Kolumbia Universitato en Novjorko kune kun studentoj disvolvis la koncepton de la vertikala farmado: Konsumplantoj estu kultivataj en altaj, pluretaĝaj konstruaĵoj ene de la urbo. La energion por la kreskado la plantoj ricevu el artefarita lumo. Ili estas provizataj per nutraj substancoj de fermita akvocirkvito. Bredado kaj rikolto okazas plenaŭtomate, 18-etaĝa farmdomo tiamaniere povu provizi 50 000 homojn per nutraĵoj.

Vertikalaj farmoj povas esti la solvo por tuta aro da problemoj en la agrikulturo: Ili bezonas nur malmulte da spaco kaj reduktas transportkostojn, ĉar la kultivitaj legomoj estas konsumataj rekte en la urboj. Malpli da forbruligita fuelo signifas ankaŭ malpli da energio de la varmdoma gaso karbondioksido.

Aliflanke en la vertikalaj farmoj povas esti aplikataj efikegaj irigaciaj metodoj kio ŝparas akvon. Unu el ili estas procedo kiu nomiĝas hidrokulturo, jam estas sufiĉe longe konata, ĉe kiu la plantoj ne plu kreskas en tero, sed en neorganika substrato kaj estas provizataj per akvo kiu riĉe enhavas nutrajn substancojn. Ankoraŭ pli moderna varianto estas la aeroponiko ĉe kiu la libere kuŝantaj radikoj de la plantoj estas surŝprucataj per akvogutetoj.

Pluaj avantaĝoj de la vertikala farmado estas: La fermitaj sistemoj igas pesticidojn superfluaj, ĉar ĝenaj plantoj kaj bestoj restas ekstere. La instalaĵoj krome bezonas malpli da sterkaĵo kio helpas al la naturaj akvofontoj. Sed la plej granda atuto estas ke vertikalaj farmoj estas plene sendependaj de klimato, de ŝanĝiĝanta vetero kaj sezonoj - kaj povas alporti multajn rikoltojn ĉiujare.

Tamen post la ondo de eŭforio aŭdiĝis kritiko: Ankoraŭ dum la fino de la pasinta jardeko esploristoj opiniis ke la kultivado de konsumplantoj per artefarita lumo estus giganta malŝparo de energio. Sed jam tiam aperis disvolvaĵo kiu revekis la ideon pri la verdaj nubskrapuloj: la triumfo de la LED.

Lumdiodoj kompare kun tradiciaj lumbulboj konvertas la plej grandan parton de la alportata energio al lumo kaj konsumas esence malpli da energio kaj tiel ŝparas kostojn. Ili ankaŭ povas esti aplikataj multe pli selektive: Ĉar plantoj uzas nur certajn partojn de la natura lumo, por vertikalaj farmoj sufiĉas LED-oj kiuj lumas blue, ruĝe kaj infraruĝe. Kaj se la LED-oj antaŭ kelkaj jaroj estis ankoraŭ nepageble multekostaj,

nun la prezoj estas signife falintaj.

Pro tiu novaj evoluoj la ideo pri la "pendantaj ĝardenoj" de la novepoko eble tamen fariĝos realaĵo. Ĝis nun montriĝas jam la unuaj realigoj. Kaj en preskaŭ ĉiuj industriaj landoj lastatempe ekkreskas novteknologiaj entreprenoj kiuj celas pliefikigi la koncernan teknikon.

Aperis vertikalaj farmoj en Germanio, Usono, sed la pionira lando estas tiurilate Japanio: Ekde la atomreaktora katastrofo en la jaro 2011 la garantiite ne radioaktivaj laktukoj el pluretaĝaj plantodomoj estas ege popularaj. Intertempe jam funkcias ĉirkaŭ 200 tiaj plantodomoj sur la japanaj insuloj. En la urbo Kameoka funkcias la plej granda vertikala farmo de la mondo. En du turoj estas plantataj kvar specioj de laktuko en 16 etaĝoj. La plantofabriko produktas ĉiutage 21 000 laktuko-kapojn por la superbazaroj en Tokio kaj ĉirkaŭaĵo. Kaj dua tia fabriko ankoraŭ fine de tiu ĉi jaro ekfunkcios por produkti preskaŭ 20 milionojn da laktuko-kapoj jare.


La 2020-jaroj tiel povus fariĝi, laŭ Guglo, la "jardeko de la revolucio de la vertikala agrikulturo".

Esperanta Retradio

---

# Saud-Arablando donis civitanecon al roboto

Sophia estas maŝino kun artefarita inteligenteco, kaj lastmerkrede (la 25-an de oktobro), dum evento por investistoj en teĥnikaro okazinta en Riado, ĝi eksciis pri sia civitaneca titolo donita de Saud-Arablando.



Tiam, la usona ĵurnalisto Andrew Ross SORKIN anoncis al la maŝino: “Sophia, mi esperas, ke vi estas aŭdanta min, ĉar vi estis honorigita per tiu titolo pri civitaneco, kiu estas la unua donita de Saud-Arablando al iu roboto”, kaj responde ĝi esprimis dankon tiamaniere: “Mi estas tre feliĉa kaj fiera. Esti la unua roboto en la mondo, kiu estas agnoskita per civitaneca titolo, estas historia fakto”.

Tiu roboto estis kreita en Honkongo, de la firmao *Hanson Robotics*, kaj ĝia aspekto estis inspirita en la trajtoj de la aktorino Audrey HEPBURN [ˈɔdri ˈhɛpbərn].

La civitaneco de Sophia estas simbola gesto de la saudaraba registaro kadre de la iniciato de la projekto NEOM, kiu estas investoplano de 500 miliardoj da usonaj dolaroj cele krei “urbon de estonteco” sur areo da 26 500 km² kovranta Saud-Arablandon, Egiptlandon kaj Jordanion.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



# Dum 20 jaroj kreskis 100 mil kvadrataj metroj da koraloj


En la fundo de la maro HUANG Hui kaj ŝia teamo laboris jam preskaŭ 20 jarojn. Ili apartenas al la Instituto de Oceanografio pri la Suda Ĉina Maro sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj respondecas pri kultivado de koraloj. La koraloj povas restarigi la suboceanan ekomedion.

HUANG Hui diris, ke kvankam la koralaj rifoj okupas malpli ol 0,2 % de la maro tutmonde, tamen la specioj de fiŝoj vivantaj tie okupas ĉirkaŭ 25%-30% de la tutaj specioj de la oceanaj fiŝoj. En la koralaj rifoj estas granda biodiverseco, kaj la ekologia sistemo de koralaj rifoj havas multajn aliajn funkciojn, kiaj oferi belajn pejzaĝojn por turismo, liveri riĉajn riĉfontojn por fiŝkaptado kaj protekti insulojn.

Surbaze de spertoj akiritaj de sia propra teamo kaj spertoj relative pli maturaj akiritaj eksterlande, ŝi kaj ŝiaj kolegoj komencis grandskalan kultivadon de koraloj submare. Ili kultivas koralidojn en proksima maro. Kiam la idoj elkreskas, la teamo transplantas ilin sur antaŭfiksitajn artefaritajn rifojn sub la maro.

Jam pli ol 6 000 koraloj estis kultivitaj, kaj ili kovras 100 mil kvadratajn metrojn de la mara areo. La atingoj de la teamo estas rezulto de penado. Pli ol triono de tempo ĉiujare estas elspezata surmare aŭ submare.

GAO Shuyuan
El Popola Ĉinio



## Einar Benediktsson


**Einar Benediktsson (31-a de oktobro 1864 en *Elliðavatn* – 21-a de januaro 1940 en *Herdísarvík*) estis islanda poeto kaj tradukisto.**

**En Esperanto aperis: *Oceano*.**

**Vikipedio**

---

## John Keats



**John Keats [ĝon kits] (naskiĝis la 31-an de oktobro, 1795, mortis la 23-an de februaro, 1821) estis angla poeto. Li estas grava reprezentanto de la angla romantismo.**

**En Esperanto aperis: *La cikado kaj la grilo; La belle dame sans merci; Somera mateno; La aŭtuno*.**

**Vikipedio**

---



## Karel Havlíček Borovský

**Karel Havlíček Borovský (31-a de oktobro 1821 - 29-a de julio 1856), ĉeĥa ĵurnalisto kaj satira poeto.**

**En Esperanto aperis: *La Bapto de sankta Vladimir; Reĝo Lavra; Tirolaj elegioj.***

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Eŭska ŝafhundo.**

**Vikipedio**